

Esperanto

EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA



Ĉion por la Redaktoro sendu al:
TOM FRASER,
2 Lady Helen Street,
Kirkcaldy, Fife.

Abonojn sendu al la Kasisto:
F-ino ANNE EYRE,
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,
Hamilton, Lanarkshire.

ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 61

Vintro 1965/66

Jarabono, 3 ŝil. (6 steloj)

Ekzistas multaj rimedoj per kiuj ni povas akceli la tagon kiam Esperanto estos plene akceptita kaj praktikata tra la mondo. La rekta metodo estas persvadi individuajn homojn lerni kaj uzi la lingvon. Grava kaj valora estas ankaŭ la metodo informi la publikon ĝenerale pri la afero, ĉu per individuaj kontaktoj, ĉu per la amaskomunikiloj kiel la gazetaro, radio kaj televido. Nur base de tia informado povas kreiĝi tia favora sento inter la publiko kia ebligus la oficialan enkondukon de la lingvo. Ĉiu letero skribita al redaktoro, ĉiu intervjuo en radio aŭ televido estas do tre valora, kaj ni ĉiam ŝatas aŭdi kaj aŭdi pri tiaj. Pasintan marton ege gratulinda iniciativo de esperantistoj en Svedujo sekvigis la akcepton fare de tiu parlamento, ke ĝi komisiu al sia registaro iniciati sciencan esploron pri la eblecoj akcepti la internacian lingvon Esperanto apud la naciaj lingvoj. Tiun sciencan esploron faru komisiono elektita de UNESKO.

La Petskriba Kampanjo dum JIK (la Jaro de Internacia Kunlaboro) donis bonegan okazon al la esperantistaro diskonigi la lingvon, kaj ĉiu subskribkolektanto povus raportii interesajn reagojn el anoj de la publiko. Permesu, ke ni parolu pri unu tia:

Ĉe kunveno sub la aŭspicio de la Skota Komitato por JIK, Parlamentaro Arthur Woodburn pledis por la plisimpligo de la angla por igi ĝin taŭga esti la internacia lingvo. "Scotsman" raportis lian paroladon jene, "..... There were Esperanto and other artificial languages but he believed English, which is already understood by 600 million people, was the obvious choice" Almenaŭ du el niaj aglookulaj (kaj laboremaj!) gesamideanoj ekagis. S-ro Mackay skribis al la redaktoro de "Scotsman" (kaj skribigis almenaŭ unu alian esperantiston), kaj F-ino Sinclair skribis al S-ro Woodburn. Ŝi ricevis la jenan respondon:- "Thanks for your letter. I am all for Esperanto if it can make the grade. But I think English is at the moment racing ahead. This does not rule out Esperanto if governments decide to accept it. I wish you meantime every success."

Tuj F-ino Sinclair reskribis sendante Petician formulon. S-ro Woodburn subskribis ĝin. Ŝi senprokraste sendis ĝin al Roterdamo. El tiaj agoj konsistas progreso, aŭ almenaŭ tia agado preparas la vojon por efika progreso. Ni lasas al niaj inteligentaj legantoj kapti la instruon de ĉio ĉi tio !

N I A J V E T E R A N O J - 7.AGNES G. MacFARLANE.

Ne nur veterano sed jubileano estas Fraŭlino Agnes G. Macfarlane, ano de la Glasgova Societo kaj Delegito de U.E.A. en Partick (Glasgovo). Fraŭlino Macfarlane pasigis siajn fruajn tagojn en Balfron, urbeto 15 mejlojn de Glasgovo, kaj tie ŝi ĉeestis la Altlernejon, kie ŝi interesigis pri lingvoj. Ŝi memoras, ke iufoje la dungisto de ŝia patro iris por viziti Cannes en Francujo, post kiu vizito lia frazlibro posedigis de ŝi.

Ne ĝis ŝi translokiĝis al Glasgovo, ŝi pripensis lernadon de Esperanto. En 1909, ŝi aliĝis al preĝeja biblia studgrupo, kies gvidanto estis esperantisto, kaj el tiu grupo estigis la kurso kie F-ino Macfarlane lernis la lingvon. Tiel frue kiel 1911, ŝi pripensis pri partopreno en Universala Kongreso, sed decidis kontraŭ irado al Antverpeno ĉar la entuta kosto, £5, estas tro alta, kaj pro tio decido ŝi devis atendi proksimume dek jarojn antaŭ ol ŝi povis ĉeesti Kongreson Universalan.

Intertempe la grupeto daŭrigis semajnan studadon kaj kunvenadon, kaj la grupestro ankaŭ okazigis diservon, kiun li gvidis ĉiun semajnon ĝis 1914, kiam li eksigis el sia laboro kaj forlasis Glasgovon. Tri fraŭlinoj el la grupo regule promenis tra la regiono ĉirkaŭ Glasgovo kaj devigis sin interparoli nur en Esperanto. Ankaŭ ili kantis la himnojn el la originala Esperanta Himmario.

En 1914 la grupo starigis la Partick-Societon, kiu kunvenis regule dum la Unua Mond-milito. En 1917 F-ino Macfarlane aliĝis al la Glasgova Societo por helpi kiel instruisto. La Glasgova Societo kunvenis lunde, kaj tiu en Partick marde, kaj kelke da spertuloj kaj entuziasmuloj partoprenadis la du kunvenojn.

F-ino Macfarlane aliĝis al la Internacia Organizaĵo, kiam la jarkotizo estis unu ŝilingo kaj kiam la gigantoj en la Movado estis Hans Jakob kaj Edmond Privat; ŝia aliĝo al B.E.A. okazis en 1917.

En 1920 nia samideanino povis partopreni sian unuan Universalan Kongreson - tiun en Hago - kaj de tiam ĉeestis preskaŭ ĉiun postan kongreson. Precipe memorinda por ŝi estis la kongreso en Prago en 1921, kiam ŝi kaj aliaj skotaj samideanoj revenis hejmen tra Nurnbergo, kie Germanaj samideanoj gastigis ilin dum tiea restado. Tie F-ino Macfarlane renkontis S-ron Otto Pillhoffer, kaj komencis korespondadi kun li. Tiu korespondado daŭris pli ol kvardek jarojn, finiĝante pro la bedaŭrinda morto de S-ro Pillhoffer en Decembro, 1964.

Amikeco kun S-ro Erik Andersen komenciĝis en 1934, kiam la Universala Kongreso okazis en Stokholmo, Svedujo, kaj la Glasgova Societo ŝuldas al tiu amikeco dankojn pro kontribuoj al sia programo pere de bendoj senditaj el Svedujo.

F-ino Macfarlane opinias, ke la plej elstaraj kongresoj, laŭ ŝia sperto, okazis en Nurnbergo kaj, partopreninte preskaŭ ĉiun Universalan Kongreson de 1921 ĝis 1960, ŝi povas fari validajn komparojn. La Kongreso en Kopenhago en 1960 estis la lasta kiun ŝi ĉeestis. Ŝi menciis, eble kun iom da sopiro, ke ŝi rimarkis, ke oni intencas okazigi la Universalan Kongreson en 1967 denove en Nurnbergo. Sed ŝi ne nur vigle subtenadis la Universalajn Kongresojn: ŝi aktive helpis en la organizado de niaj skotaj Federacio-Jarkongresoj kaj krom tio oficis kiel sekretario por la Federacio dum pluraj jaroj.

La Partick-grupo nun ne plu ekzistas ĉar ĝi kunfandiĝis kun la Glasgova Societo. F-ino Macfarlane preparis la sortojn de aliaj skotaj grupoj. La nombro de anoj en la Glasgova Societo dum la jaroj ĝis nun malpliigis, sed ankaŭ la sama afero okazas en aliaj grupoj. Nia samideanino memoras kiam forta grupo ekzistis en Kirkcaldy, ankaŭ kiam pli ol tricent esperantistoj aniĝis al la Edinburga Societo. Entuziasmo por Esperanto ĉie en Skotlando malpliigis.

Laŭ F-ino Macfarlane, la plej sukcesa periodo por la Esperanto-movado en Skotlando estis dum la jaroj post la unua mondmilito. Proksimume po tridek studentoj aliĝis por la kursoj de la societoj, kaj tiuj grandaj kursoj helpis la sukceson de la societoj mem.

Pli granda entuziasmo ekzistis tiam ol en la nuna erao. Junuloj estis pretaj distri sin, fari penojn amuziĝi, sed ne nun - hodiaŭ ili preferas la pasivan distradon de la televido.

Petite kiel oni povus plibonigi la staton de niaj grupoj hodiaŭ, F-ino Macfarlane povis proponi veniun solvon. Dum pasintaj tagoj oni reklamis, organizis publikajn kunvenojn, parolis al aliaj grupoj, sed la sukceso neniam estis tia kiam oni esperis kaj deziris, kaj ŝi timas, ke niaj hodiaŭaj provoj kaj penoj havos la saman sorton.

Tamen, super ĉio, F-ino Macfarlane restas konvinkita pri la valoro de Esperanto. La Societo en Glasgovo kaj la Movado en Skotlando multe ŝuldas al la veteranoj tiaj, kia estas nia fidela samideanino.

T. N.

BONSANCAJ estos partoprenontoj de la 2a LERNEJO-KONFERENCO, kiu okazos inter 23a kaj 28a de julio, 1966, en GRAZ, la "ĝardenurbo de verda Stirio". La konferencejo estas komforta studenta loĝejo kaj la programo (taŭga ankaŭ por ne-instruistoj) interesa kaj la distroarangoj allogaj.

Kotizo ĝis 31/1/66, 32 britaj ŝilingoj; ĝis 31/3/66, 40ŝ; poste, 48ŝ. Lito kaj matenmanĝo en la studentejo 16 ŝ. nokte. Ankaŭ hoteloj disponeblas se oni tion preferas. Interesatoj skribu al: 2a Lerneja Konferenco, A - 8046 GRAZ, Aŭstrio.

Post la konferenco oni povas vajiĝi kune al la 5a Universala Kongreso en Budapeŝto.

M A R I M O R I S O N **

de

ROBERT BURNS.

1759 - 1796

Fenestren venu, Mari nun,
 Anoncis sin jam nia hor',
 ridetojn donu kiel sun',
 paligas apud ili, or':
 Ĝojpenus mi ĉe sklavlabor'
 en eĉ plej drasta, kruda son'
 se ĝi kondukus al la kor'
 de bela Mari Morison.

Hieraŭ laŭ la kordotrem'
 sub lustroj pulsas festdancad',
 sed min forportis am-revem'
 al vi for de la belparad'.
 Rivalis inoj al papav'
 pro briloj inda tostpropon',
 sed spiris mi ĉe scenorav'
 "Por mi, nur Mari Morison !"

Ĉu lasi, Mari en sufer'
 lin kiu amos vin ĝis mort' ?
 Ĉu lian koron malesper'
 frakasu en senkulpa sort' ?
 Se por mi mankos reciprok',
 kompaton montru en rekon'
 ne povas veni vunda vort'
 el Brust' de Mari Morison !

Honore al la 207a datreveno
 de l'naskiĝo.

** Ĉefakcentu la unuan silabon de ambaŭ nomoj.

(Traduko kantebla laŭ la kutima ario.)

NOVA ERAO KOMENCIGIS POR EDINBURGO.

Nelonge post sia fondiĝo en 1903, la Societo sin nestis en Synod-Halon, unue en ĉambro 26, poste en la fame konata 29. Nu, laŭ la urboplanistoj la hal-komplekso Synod malaperes por doni lokon al operejo. La Societgvidantoj decidis luadi ĉambron en Zetland Hall, 11 Pilrig St., por nur merkredoj. Tio rezultigos bonvenan ŝparon, kaj la nova ejo estas pli komforta kaj moderna ol la tradicia. La Edinburga Societo estis unu el la nemultaj en la mondo kiu posedis propran ejon; tio estas, ĝi estis la sola okupanto de difinita ĉambro. Efektive, ĝi, por iom moderigi la pezan finanĉan ŝarĝon, jen kaj jen permesis al aliaj uzi la ĉambron: cetero ĝi ne disponis pri ĝi kiam la halaro estis fermita, ekzemple dimanĉe, do la diference inter la nova kaj malnova ne estas tiom akra kiom ĝi unuavide ŝajnas. Kun "29, Synod-Halo" ligiĝas por ni sinsekvo da eminentaj esperantistoj - Charles Sarolea, W. Page, John W. Warden, W. Harvey, Agnes B. Deans, kaj multaj aliaj. Listo de famaj vizitantoj de ĉiu mondparto inkluzivus Profesoron Cart, Harrison Hill la angla amuzisto, Kolonelon Pollen, Andreo Ce, Montague C. Butler, Profesoron Lapenna, Tibor Sekelj, k.t.p. Ne estas loko ĉi tie verki historion pri "29" kaj la Societo, kaj fine societo konsistas el anoj, ne ejo. Ni certas, ke la nunaj anoj inde daŭrigos la por-Esperantan laboradon kiun komencis niaj ŝatataj pioniroj.

(Ni dankas al S-inoj Simon kaj Whitehead kaj S-ro John P.W. Murray pro informoj kiun ni parte utiligis por ĉi supra raporto.)

KOMUNIKAĴO de la AKADEMIO de ESPERANTO.
(El Prezidanta Komunikĉo)

La unua jaro de mia prezidanteco (1963 - 1964) estis dediĉita al la revizio de la Statuto, al la interna reorganizo kaj al provoj starigi en la akademianaro pli justan reprezentadon de la diversaj lingvofamilioj.

En la dua jaro (1964 - 1965) la Akademio esploris du ĉefajn demandojn, kiuj jam de longe atendis ian solvon, tiun pri la uzado de la pasivaj participoj kaj tiun pri la gramatika kategorieco de la radikoj; pri ambaŭ estis jam atingitaj decidoj: pri la unua demando, la plimulto de la Akademio konstatis, ke la ekzemploj entenataj en la "Fundamento" ne povas esti klarigataj laŭ la tiel nomata "nete tempa sistemo" sen arbitra perforto de ilia senco; pri la dua demando, la plimulto konstatis, ke la Esperantaj radikoj havas unu gramatikan karakteron kaj ke la analizo de De Saussure, kompletigita de Wuster kaj de Kalocsay, respondas al la realaĵoj de la lingvo.

La koncernaj Sekcioj (pri Gramatiko unuflanke, kaj pri la Komuna Vortaro aliflanke) nun prilaboras la tekston de la definitivaj resolucioj pri tiuj du demandoj. La ceteraj Sekcioj, pri la Teknika Vortaro, la Bibliografio, la Prononcado kaj la Literaturo pretigas nun raportojn pri temoj poste esplorotaj de la Akademio.

Nova Adreso:
 182-G, Av. Rouget de Lisle,
 94 VITRY-sur-SEINE, Francujo.

G. Waringhien.

NIA AFERO ANTAŬ LA PUBLIKO.

Je vendredo la 17a de Septembro aŭskultantoj al la B.B.C. Hejmaprogramo, kiuj atendis aŭdi la rutinan anoncon "The time is eight thirty and here is 'Today in Scotland' ", estis mistifikitaj aŭdi anstataŭe: - "La horo estas oka tridek kaj jen estas 'Hodiaŭ en Skotlando' de Edinburgo". La voĉo estis tiu de S-ino Mia Casey, kaj la sekva intervjuo rezultigis de la ekspozicio de Esperantaj libroj kiun la Edinburga Esperanta Societo muntis en la publika biblioteko ĉe George IV Bridge. Kvar voĉoj efektivigis la dissendon, du B.B.C.-istoj kaj Mia kaj Jack Casey, ĉi dua tradukante la Esperantajn respondojn de sia edzino kaj ankaŭ mem donante respondojn al pri-Esperantaj demandoj. En la daŭro de la preskaŭ triminutlonga programero, li informis pri sia renkontiĝo kun Mia, ilia uzado de la lingvo hejme, la partopreno de Edinburgaj esperantistoj en JIK, eldono de la Sankta Biblio en Esperanto kaj ĝia dediĉo en St. Giles-Katedralo okaze de la Universala Kongreso en 1926, kaj la Edinburga Poŝ-Vortaro, ĝiaj kompilintoj kaj disvendado tra la angleparolanta mondo. Koran gratulon al ĉiu kiu ebligis kaj efektivigis ĉi tiun valoran propagandajn! (Kiom kostus triminuta reklamo en komerca televido?)

DENOVE :- Je la 6a de Oktobro S-ro R. Mackay, vicprezidanto de la Edinburga Esperanta Societo, responde al peto, vizitis al Berwick-on-Tweed por paroli pri Esperanto al nove starigita Lingvista Societo en la tiea Grammar School. Dudek kvin lernantoj inter 15- kaj 18-jaraj kun la lernejestro kaj kvar instruistoj atente aŭskultis. Je la fino S-ro Mackay donis specimenan lecionon kaj respondis al pluraj demandoj.

Kaj ankoraŭ DENOVE :- La 14an de Novembro S-ro R. Mackay parolis pri la lingvo kaj movado al St. Stephen's Church Youth Circle, Edinburgo. Ĉeestis proksimume 20. Ili montris sian interesigon per inteligentaj demandoj al la parolinto.

VETERANO John P.W. Murray daŭrigas sian bonan laboron propagandan. Lia raporto pri la Tokia Universala Kongreso (kompilita el informo en la Esperanta Gazetaro, alirebla por ĉiu el ni) estis presita sensange en la ĵurnalo "Northern Scot", Elgin. (Iuj esperantistoj restas ĉiam sur posteno: aliaj - sur postaĵo !)

In the "NEWS" Bulletin of the Workers' Educational Association (New Zealand) October issue, appears a letter from a Scottish esperantist arising from an article in the March issue, "Languages Invade our Frontiers" by Prof. Sussex. The professor had concluded by proposing that the unfortunate children of New Zealand be taught not one or two foreign languages but a dozen or so ! We quote from the esperantist's letter: - "Seldom have I seen the whole complexity and immensity of our modern Babel put so starkly; fact buttressed fact, argument argument, but alas, the article is unfinished! Professor Sussex slips out from his reasoning train just before it reaches its obvious, final destination - Esperanto. All the "pressure cooker" language courses which our gadget crammed world can mass produce (if not sell) will not give us the final solution which is that every terrestrial, in addition to his mother tongue, be given as a birth right, the marvellously simple, demonstrably adequate and lovably beautiful Esperanto, the linguistic key to a unified, yet heterogeneous cultural, economic and co-operative world order."

La 50a BRITA KONGRESO. Energie ekagis la Loka Kongresa Komitato en Norwich, en kiu agrabla urbo okazos la Jubilea 50a Brita Kongreso de Esperanto, je Pentekosto, 27 - 30a de Majo 1966. Aligontoj povas senti certa, ke ĉi tiu evento, ĉe kiu devo kaj plezuro koincidos, nepre rekompencos ilin per plezuro spertota, kaj samtempe ilia partopreno pligos la prestiĝon de la lingvo. Kelkaj skotoj jam aliĝis, kaj ni esperas ke pliaj legantoj de ĉi tiu Bulteno decidus ankaŭ enskribi sin. Ni citu el la aliĝilo:- "La L.K.K. jam rezervis grandan halon (St. Andrews), kiu povas akcepti 1000-1200 ĉeestantojn. Ni esperas fari ĉi tiun Jubilean Kongreson la plej impona en la historio de la Brita Esperanto-Movado Ĉu vi povos nur bicikli al Norwich, dormi en tendo, nutri per sandviĉoj, ni petegas vin ĉeesti la Jubilean Kongreson kaj montri, ke Esperanto estas la sola praktika internacia lingvo.!"

(La samideanoj en Glasgovo akceptis inviton okazigi la Britan Kongreson en 1957.)

INTERNACIA TURISTA ASOCIO EKUZAS ESPERANTON. En 1965 La Turista Asocio La Naturamikoj festis sian 70-jaran jubileon, kaj por signi tion ĝi eldonis 64-paĝan broŝuron en kvin lingvoj. Konforme al ĝia freŝdate alprenita statuto-ero, "Progresigo kaj apogo de la strebado al internacia lingvo, ekz. Esperanto", unu el tiuj lingvoj estas la nia. La amaso da bildoj, inter kiuj multaj estas fotografiaj juveloj, montras ĉiujn aspektojn de la naturamika aktiveco. Mendu la broŝuron (mencianta "Esperanto en Skotlando") de:- Country Friends Tourist Club, Room 6, Waterford Building, Richmond St., LIVERPOOL. (Oni ne mencias prezon).

La Ĉina Esperanta Ligo ankoraŭfoje atentigas pri sia organo:- EL POPOLA ĈINIO. Kun sinteza enhavo, riĉaj ilustraĵoj, belkoloraj bildoj, modesta prezo kaj favoraj donacaĵoj, ĝi estas vaste bonvenigita de diverslandaj esperantistoj kiel leginda esperantaĵo. Abonantoj povas senpage ricevi belan Esperantan Kalendaron de 1966, kaj la pli fruaj mendintoj povas ricevi ankoraŭ memoran notlibron, kiu estas utila kaj por ĉiutaga notado kaj por propagando de Esperanto. Nature EL POPOLA ĈINIO esprimas la vidpunkton de sia lando en politikaj kiel en aliaj aferoj, sed esperantistoj ŝatas legi la idearon de aliaj popoloj, eĉ se ili trovas ilin tre alia ol la sialanda. Ĝi aperas dumonate kaj la normala kosto estas 10 steloj (5 ŝil.); mendebla ĉe B.E.A. Se elsendi monon estas malfacile, oni povas enabonigi kredite ĉe la libroservo de ĈEL, P.O. Kesto 313, PEKINO, Ĉinio.

Jus aperis "BESTKALENDARO, 1966", grandformata kalendaro kun pentritaj kolor-bildoj. La kalendaro uzas egalrajte la germanan kaj la Esperantan lingvojn. Esperantistoj povas akiri la kalendaron, kiu estas ankaŭ bona varbilo por montri al neesperantistoj aŭ donaco por amikoj, laŭ speciala aranĝo de la eldonisto, je la nuraj efektivaj kostoj de produktado kaj ekspedo, tio estas, proksimume la duono de la prezo se oni aĉetus en butikoj. Unu ekzemplero kostas entute 15 stelojn (7/6), sed du menditaj samtempe kostas nur 13,1 stelojn (6/11). Mendu kaj pagu al U.E.A. Delegito, Past. Adolf Burkhardt, (Prezidanto de KELI), Poŝtĉekkonto 102549 Stuttgart, 7261 GECHINGEN, ueber Calw, Germanujo (Fed. Resp.)

RECENZO.

ESPERANTO: A NEW APPROACH. de William Auld, M.A., D.B.E.A.

Eldonis Heroldo de Esperanto. Formato 13 x 18,7 cm. 92 paĝoj (14 lecionoj, 46 ekzercoj, kun ŝlosilo por memlernantoj; literaturaj legaĵoj el la plumoj de la plej famaj Esperanto-verkistoj; vortareto Esperanta-Angla).

Prezo 1,2 dolaroj (8/7d).

Nova triumfo por Skotlando! Ĉi tiu libro metas Esperanton sur pli altan nivelon ol iu alia lernolibro. Jam en la oka leciono ni legas la belstilan Marie Henkel kaj, turninte ĝis la ŝlosilo, tie ni legas, ne laŭvortan tradukon, sed egale belstilan artaĵon, kiu pensigas nin, ke pluraj lecionoj pri la angla lingvo ne estus malutilaj. Pro tio, multaj el ni, kiuj jam parolas Esperanton, sed kies esprimkapablo ĉe nia nacia lingvo ne estas altgrada, certe gajnos profiton per zorga studado de tiuj paĝoj.

En la antaŭparolo la verkisto klarigas, ke li celas ebligi la studenton legi Esperanton. Por mi, longtempa esperantisto, estas malfacile juĝi kiel li sukcesos ĉe komencantoj, sed mi kredas, ke ĉe bone edukitaj homoj li certe trafos sian celon. Liaj traktoj pri gramatikaj punktoj estas tre klaraj. Mi sugestas, tamen, ke kelkaj gravaj konsiloj devus esti en pli grandaj, presliteroj. Ekzemple, mi presus GRANDLITERE la fakton, ke ESTI ĉiam postulas la NOMINATIVON.

Utila parto de la plano de la libro estas la presado de novaj vortoj flanke de la legaĵoj. Tiel oni povas legi kun minimumo da hezito. Mi kredas, ke S-ro Auld senpense skribis, ke la sufikso "-ebl-" signifas "able", anstataŭ "possible". La leganto inklinos rezoni, ke EBLECO signifas "ability".

La preskaŭa malesto de preseraroj estas gratulinda. Jes, al ĉi tiu "Nova Proksimiĝo" mi donas preskaŭ cent pro cento da poentoj.

R.M.

"JEN ESTAS HELPO POR VI" estas 56paĝa broŝuro, verkita de Kristano Venkanta, Usonano. Elangligis A.F. Doneis. Senpage ricevebla por la aŭfranko (2 respondkuponoj aŭ U.L. Steloj).

La aŭtoro estas eks-ŝipkapitano, nun pastro. Li volas helpi la leganton akiri sekurecon, pacan animon kaj veran feliĉon. Ĉiu obeu Dion, legu la Biblion kaj preĝu al Jesuo por venki ĉiujn ĉagrenon, doloron, komunismon kaj malĝojon. Li ne specifas preĝadon por venki la problemon en Vietnamio kie li lasas la solvon al Jesuo Kristo. (Estus bona ideo se lia registaro akceptus la konsekvencon de tiu propono kaj elprenus siajn trupojn kiuj, kune kun Vietnamaj de Sudok kaj Nordo, serĉis solvon pere de bajonetoj, flambomboj kaj simile, jam kelkajn jarojn.) Vera sukceso ne estas la akiro de riĉaĵo k.c., sed la farado de la Dia volo, kaj ŝajne li scias kia estu tia farado. Li priskribas kiel mortis lia edzino - ŝi vokis dufoje, "Vidu ĝin! Rigardu ĝin!", kaj poste, "Se vi nur povus vidi kiom belega ĝi estas!", kaj ŝi tuj mortis. Tio estis por la aŭtoro pruvo, ke estas vivo post la morto, en la ĉielo. La lingvo estas simpla kaj facile komprenebla, kaj la argumentoj ŝajnas esti akceptindaj por multaj kredantoj. Li emfazas la valoron de preĝado - "(Mi) travivis du militojn kaj vivas nur ĉar Dio respondis al miaj preĝoj. Mi povus rakonti mirindajn respondojn al miaj preĝoj dum la Dua Mondmilito, kiam mi estis kapitano de ŝipo."

Dissendas la libreton, Esperanto Press, Cardiff, Ontario, Kanado.

~~P.S.~~ kaj T.F.

"LANTERNO" estas nova, 4 paĝa, ĵurnalaspekta revuo, kiu sin priskribas "sendependa internacia gazeto" "ne neŭtrala". Ĝi akre atakas la komunismon ĝenerale. Por ĝi "komunismo" kaj "malbonismo" estas sinonimoj. Ĝi specife denuncas Titoismon pro la enkarcerigo naŭmonata de Milhajlo Mihajlov pro lia artikolaro, "Moskva Somero, 1964" en kiu li akuzis Sovetion pri ĉiaj malbonoj per malmoderaj frazoj. Jarabono (6 n-roj) 6 markoj, do 10 ŝil., de S-ro Ljubiša Jetvić, Infanteriestr. 12/1., 8 Munchen, 12, Germanujo.

"Der ESPERANTO" estas nova dumonata gazeto de la (Orienta) Germana Kulturligo, havebla de 108 Berlin, Otto-Nuschke Stra., prezo ŝajne 30 pf (6 pencoj) por unu numero. Ĝi estas direktita al lernantoj; ĉio en la germana, kun unu longa artikolo tradukita en Esperanton. Ĉi tiu vokas al okcident-germanoĵ unuiĝi kun orient-germanoĵ por malhelpi ke la unua ekipu sian armeon per nukle-armiloj. Ĝi estas kelkrilate la malo de "LANTERNO".

La redakcio de "CO-OP. NEWS" konsideras eldoni ĉi tiun monatan bultenon, pri ĉeĥoslovakaj kooperativoj, kiu jam aperas en ok lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Por decidigi ilin, skribu al:- CKK, TĚŠNOV, 5, PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio.

DENOVE ESPERANTO EN LA SVISA RADIO.

Ĉi tiu stacio, kiu bedaŭrinde devis, komence de 1964, ĉesigi siajn Esperantajn dissendojn tradiciajn jam de 1946, anoncis en oktobro pasinta, ke ĝi denove elsendos ek de novembro 1965, jene :-

Lunde	12:00 (horo de Greenwich)	Parolas D-ro Baur
Merkrede	12:00	Prof. Gacond
Ĵaŭde	21:15	Ripeto de la lunda elsendo
Sabate	21:15	Ripeto de la merkreda elsendo

La ondoj estas 48,31 kaj 31,46 metroj plus, tagmeze, 13,94; vespere 25,61. La daŭro de la elsendoj estas maksimume ok minutoj. Kiel antaŭe la direkcio petas aŭskultantojn konfirmi ricevon kaj esprimi siajn opiniojn pri la enhavo de la programoj. Ĉiu korespondanto ricevas regule la ilustritan sendprogramon aperantan dufoje en la jaro. Jen la adreso:- Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, Giacomettistr. 1, 3000 BERN 16, Svislando.

SKOTO ĉe HAMLET-URBO.

La 18an de Julio 1965 mi alvenis ĉe la internacia altlernejo en Elsinoro. Mi estas izolita esperantisto kaj ne havas la eblecon interparoli, ĉar estas neniu en la tre malgranda vilaĝo kie mi loĝas, kiu scipovas Esperanton. Mi komencis lerni ĝin en Julio, 1963, per "Teach Yourself Esperanto" kaj la "Popular Correspondence Course" de B.E.A. Per diskoj ne multekostaj, kiujn aranĝis S-ro Friis, mi povas ekzerci min pri la parolado de Esperanto. Per la helpo de la kursgvidantoj kaj la afableco de la partoprenantoj mi ĝuis tre agrablan ferion en Danlando. Ĉar mi estis la sola el Britujo, mi devis paroli nur Esperanton, kaj tio estas la plej certa maniero por uzi ĝin.

La vetero estis belega kaj saniga, la manĝaĵoj tre bongustaj kaj ampleksaj, kaj la kursoj tre interesaj. Mi intencas reiri al Elsinoro la venantan someron.

.Joseph Fettes (Altnaharra)

NEKROLOGO

E. Rosslyn Mitchell.

La lastatempa forpaso de la bonekonata Glasgova advokato, E. Rosslyn Mitchell, signifas por nia movado grandan pardonon. S-ro Mitchell, tre mult-okupata homo, ne ofte aktivis en la kluba vivo de Glasgova Esperanta Societo, tamen li estis forta subtenanto de la lingvo.

Kiel klera homo li ne senkritike akceptis ĉiujn diraĵojn pri la meritoj de Esperanto. Pri unu punkto li deziris esti certa, nome, ĉu homoj el diversaj nacioj facile komprenas unuj la aliajn pere de la internacia lingvo. Hazarde, dum la okazigo de Universala Kongreso en norda lando li trapasis la Kongresurbon kaj decidis viziti la Kongreson dum unu/du horoj. Li trafis la ofte tre viglan Ĝeneralan kunvenon. Kiam poste mi renkontis lin en Glasgovo li diris, ke tiu sperto tute konvinkis lin. Li miris pri la fluaĵ paroladoj en la lingvo kaj ankaŭ pri la tutevidenta interkompreniĝo.

Plurfoje, okaze de la komenco de nova sezono en Glasgovo, li faris brillan publikan paroladon, vere oratorajn, ĉar li majstris la anglan lingvon. Ĉe unu tia publika kunveno li, kun fiero, montris al mi la malnovan Esperanto-lernolibron, per kiu, kiel studento, li studis la lingvon. Sur la kovrilpaĝo mi rimarkis lian nomon kaj la daton, 1909. Iam li kaj mi diskutis la timemajn sentojn kiuj afliktas multajn, antaŭ iliaj paroladoj kaj eĉ dum ĉi tiuj. Al mi E.R.M. ĉiam aspektis tre aplomba ĉe paroladoj. Mi do sugestis, ke tiaj timsentoj neniam tuŝas lin. "Vi eraras," li tuj respondis, "Ankaŭ mi, antaŭ ol mi komencas mian paroladon, spertas tiajn sentojn. Sed tuj kiam mi ekstaras por paroli, mi fariĝas tute alia homo."

Politike, multaj memoras lin pro du eventoj, unue lia venko super Asquith ĉe la Ĝenerala Voĉdonado en Paisley 1924, kaj due, lia brila parolado en la Parlamento, okaze de la debato pri la revizio de la Angla Preglibro.

D.K.

Andrew Morton.

Kun malĝojo ni aŭdis ke nia samideano, Andrew Morton el Methil, mortis en la malsanulejo Victoria, Kirkcaldy, je la 22a de Decembro.

Plena nekrologo aperos en nia sekvonta n-ro 62.

